nia voĉo

madrida esperanto-liceo novembro 2018

## JUNULARA RENKONTIĜO EN DECEMBRO

La junulara sekcio de Hispana Esperanto-Federacio, HEJS, organizas renkonton por la komenco de decembro, profitante la ponton de festoj de tiu semajno. Ĝi estos neformala evento, por rendevui, amuziĝi, sin organizi kaj ĉefe paroli en Esperanto.

La evento nomiĝas "Benkontiĝo", kaj okazos inter la 6a kaj 8a de decembro en la junulargastejo Richard Schirrmann, ĝuste en la granda parko Casa de Campo de Madrido.

Por koni pliajn detalojn kaj aliĝi, skribu al hejs@esperanto.es.




## PREZENTITA NOVA GRUPO EN FUENLABRADO

La 16an de oktobro prezentiĝis nova esperantista grupo, la Fuenlabrada Esperanto-Ligo, en la sidejo de la Oficiala Lingvolernejo (E.O.I.) de tiu sudmadrida urbo. La prezentadon gvidis la lanĉintoj de la grupo. Ĉeestis ankaŭ la prezidantoj de Hispana Esperanto-Federacio kaj de Madrida Esperanto-Liceo.



La agado taŭgis ankaŭ kiel prezento de la nova kurso kiu komenciĝis je la sekva semajno en tiu sama Lingvolernejo EOI (strato Islandia, 1). Ĝi estos instruata ĉiujn mardojn ĝis la 29a de januaro 2019, de 17:00 ĝis 18.30, je baza nivelo,

La grupo jam estas kontaktebla per provizora retejo http://esperanto.es/fel/ kaj per la retadreso fuenlabrada@esperanto.es. La prezidanto estas Isidoro Ortega, kiu nuntempe estas la vicurbestro kaj urbkonsilisto pri edukado de la municipo.

Pri la prezento kaj la kurso informis la sudmadrida radiostacio de la Cadena SER kaj la loka retportalo Fuenlabradanoticias.com.

## SABATA RENDEVUO KUN VIZITANTO

La unuasabata rendevuo okazos denove ne la unuan, sed la duan sabaton de la monato, pro la *ponto* de la unuaj tagoj de novembro. Ni profitos la venon al Madrido de ekstera vizitanto, Murat, el Turkio, por renkontiĝi proksime al la stacidomo Atocha.




Konkrete, la rendevuo okazos la 10an de novembro, je la 17 horo, en la kafejo de la kulturcentro "MediaLab Prado", strato Alameda 15, enirejo vid-al-vide de CaixaForum.

Kiel anoncite, la renkontiĝo en oktobro okazis en malferma loko, en la parko Retiro (vidu apudan foton). Krom madridanoj, ĉeestis ankaŭ homoj el Toledo, Aranjuez, Vitorio (Gasteiz) aŭ Italio, iuj venintaj por la okazo kaj aliaj pro sia ekrestado en nia regiono. Kaj ankaŭ ĉeestis, silente, nia historia pioniro Ricardo Codorniu.

## MONATA LITERATURA VESPERO

Ni reprenas la kutimon de la literatura vespero kiun ni komencis organizi unu fojon ĉiumonate dum tiu ĉi jaro. La 19an de novembro ni organizos komunan laŭtlegadon de teatraĵo. Kiel kutime, je la 7a vespere.

## KAMPANJO POR ALIĜO AL HEF POR 2019

Hispana Esperanto-Federacio malfermis novan kampanjon de aliĝo al la asocio por 2019. Nun kun specialaj kotizoj por junuloj kaj kun donaco se oni aliĝas antaŭ la fino de la jaro.

La aliĝiloj estas disponeblaj papere en la sidejo, kaj rete en la adreso: http://www.esperanto.es/inscripcion.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

Kutimaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com